# bulteno

DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA
ĈE KULTURCENTRO DE ONV 2

N-ro 55

červen - červenec

BIBLIOTHEQUE LA CHAUX-DE-FONDS Li BUL

15 JAROJ

Kopio n-ro 1214
Ŝtata gravaĵo!
Tute sekreta!

Berlin, 27.4.1942

MEMORIGOJ AL LA ĜENERALA PLANO "OST":

"La ĝenerala plano "Ost" supozas,ke post la milito oni devos senprokraste sidlokigi ĉirkaŭ 4,550.000 personojn en orientajn teritoriojn. Tiu ĉi nombro ŝajnos al mi ne tro alta, se oni kalkulas kun tio, ke la kolonigo daŭros 30 jarojn. Estas tute eble, ke ĝi povus esti eĉ pli alta."

Sekvas rubrikoj pritraktantaj unuopajn naciojn,nome Polojn,Ukrainanojn Blankrusojn,Rusojn. Speciale interesas nin kompreneble la rubriko kun jena titolo:

PRI DEMANDO DE ĈEĤOJ:"Laŭ nuntempa opinio la Ĉeĥoj povas esti grandparte ĝermanigitaj, ĉar ili ne kaŭzas zorgojn el rasa vidpunkto. Ĉirkaŭ 50 % de la ĉeĥa loĝantaro entute povas esti ĝermanigitaj. En tiu ĉi kalkulo restas tamen ankoraŭ 3,5 milionoj da Ĉeĥoj, kiuj ne taŭgas por la ĝermanigo kaj kiujn oni devos pograde ellokigi el la teritorio de la regno.

Oni devas konsideri, ke tiuj Ĉeĥoj estu translokigitaj al Siberio, kie ili intermiksiĝos kun Siberianoj kaj tiamaniere kontribuos al plua fremdiĝo de Siberianoj rilate al rusa nacio. La venonta germana politiko koncerne la Orienton montros, ĉu ni vere estas pretaj garantii la firman bazon por daŭra ekzisto de la Tria Imperio. Se la Tria Imperio devas ekzisti miljarojn, niaj projektoj devas esti ellaborataj por tutaj generacioj. Kaj tio signifas,ke la rasa-biologia ideo devas en la proksima germana politiko posedi decidan rolon. Nur tiel ni povas sekurigi la estontecon de nia nacio.

D-ro WETZEL,
departamentestro de la 1-a politika ĉefadministrejo de la ministerio por okupitaj orientaj teritorioj."

Legante tiun kaj la similajn arkivaĵojn, oni ne povas eviti impreson de preskaŭ utopia nerealeco. Kaj tamen, milionoj da murdigitaj viroj, virinoj infanoj, de kiuj eĉ cindro jam ne restis, atestas la teruran fakton de tiu historia frenezo de nia jarcento.

Pri "miljara regno" revis la fanatika doktoro, ne supozante, ke post nur tri jaroj li vidos malgloran finon de la antaŭtempa gloro. Ĉar estas tro kuraĝe en nia epoko kalkuli kun miloj da jaroj, en epoko, kiam la dukvin-, sepjaraj planoj transformas la aspekton de ŝtatoj kaj la vivon de popoloj.En epoko,kiam la sciencaj atingaĵoj superigas fantazion de utopiistoj...Kio estos post mil jaroj? Jen - post nuraj dekkvin jaroj la Tria regno fariĝis nur estinta fantomo. Post dekkvin jaroj la landoj liberigitaj de la naciisma okupacio rapide ŝanĝas ne nur sian aspekton, sed ankaŭ la internan vivmanieron.

Hodiaŭ en socialisma Ĉeĥoslovakio, kies ĉeĥa loĝantaro estis kondamnita al duonevakuado, kreskis la produktiveco de la laboro en la industrio dum 10 jaroj /1948-1958/je 232%, kio ebligis la rapide kreskantan vivnivelon de ĉiuj laboruloj. Ĉirkaŭ 80% de agrokultura tero apartenas al kooperativoj aŭ ŝtataj bienoj. Tio senkompare ŝanĝis socian karakteron de nia kamparo, ĉar rapide malaperas diferenco inter urbanoj kaj kamparanoj.

Sur ĉi tiu bazo disvolviĝas grandioza kultura revolucio, celanta al altnivela socio de homoj,ĉiuflanke memfidaj kaj klerigitaj, ĉar nur tia socio estos matura por efektivigi la komunismon.La 15-a datreveno de liberigo trovas nin survoje al efektivigo de tiu longtempa homa revo. Ni esperantistoj,tiom alkutimiĝantaj trabori novajn vojojn,ne timu marŝi en la unuaj vicoj de la veraj homoj, kiuj iras antaŭen al felica komuna vivo de ĉiuj popoloj sur nia planedo.

jmh